Gjutaren och nämndemannen Emil Falk i Skövde blev som väntat var livligt hyllad på sin 60-årsdag den 14 sept. Stadsfullmäktige och häradsrätt, arbetskamrater och föreningsstyrelser uppvaktade med gåvor och blommor, och Skaraborgs Esperanto-distrikt frambar en subskriberad penninggåva. Enligt jubilarens önskan skall denna bilda grundplåt till en studiefond, som fått namnet "La studfondo de Emil Falk — Esperanto al la junularo". Den årliga avkastningen av denna fond är avsedd att komma barn och ungdom till godo som bidrag till esperantokurser, studiemateriel och ekonomisering. Esperantoklubben, blåbandsföreningar och enskilda vänner uppvaktade personligen eller per telegram, och lokalpressen omnämnde utförligt dagens händelser.

S. E.

la tuta aŭtuno, se vi atente studas. Ne prenu tro grandajn porciojn!

Se vi tion estos traleginta, vi povos tralegi certajn artikolojn en Originala Verkaro de Zamenhof, se iu el via rondo havas ĝin aŭ la klubo posedas ĝin. Ekzistas multaj tre valoraj kaj interesaj partoj en ĝi.

Cetere vi povos daŭrigi per La vivo de Zamenhof de Privat kaj per la supre nomita libro de la sama aŭtoro. Legi tiujn librojn estas same necese kiel legi la nomitajn verkojn de Zamenhof.

Bonan sukceson!

## Verda familio.

Birger Gerdman kaj Gun Fernblad geedziĝis la 18 septembro. Gerdman, inter amikoj nomata Bigo, estas la gardisto de nia trezorejo de antaŭ pli ol du jaroj. Lia profesio estas revizoro, kaj sekve li estas spertulo pri librotenado, ĝuste tia zorgema kaj fidela kunlaboranto, kian ni bezonas sur tiu posteno. Oni povas nur bedaŭri ke dum la tri unuaj monatoj de la jaro li dronas en laboro pro sia profesio kaj samtempe devas pretigi la ekonomian



raporton de SEF. Sed lia devizo estas crdo en ĉio, kaj ni povas esti trankvilaj.

Por la esperantistoj li estas konata kiel tradukinto de "Tra sovaĝa Kamĉatko" de Sten Bergman kaj kiel kunlaborinto pri la granda sved-esperanta vortaro.

Kiam ni unue renkontis lin en la klubo, li ŝajnis esti ne tre ĝojplena homo, sed poste ni fariĝis la plej bonaj amikoj dum biciklaj ekskursoj kaj migradoj en la arbaro. Tie li estis si mem, trankvila, malrapidparola, humorplena granda knabo. Kiam ni orientadas kaj la afero estas rekte tra la "geografion" trafi certan celon, li povas diri, trovinte paŝojn: "La vojo ja devas ien konduki", kaj li kondukas nin al erara loko. Li plej ofte estas gvidanto por la ekskursoj de Migranta Rondo, kaj pro lia profunda kono de la tereno ĉirkaŭ Stockholm li komponis por ni brilajn ekskursprogramojn. Cetere li fumas pipon kaj legas detektivajn romanojn.

Lia edzino Gun, kiu ne volas esti nomata Ludde, blondhara, bluokula, estas pli rapidmova, same ŝia lango. Per siaj karakterizaj esprimoj ŝi ofte ĝuste trafas la kapon de la najlo. En ilia geedza disputado ŝi eble havas la lastan vorton. Sed tiam Bigo tamen havas sian pipon.

Okazis iam ĉe MoRo-ekskurso ke pro malfavora vetero nur ili partoprenis. Ili estis surprizitaj de pluvego kaj devis atendi sub abio en la vasta arbaro. Ne strange ke iliaj animoj havis tempon kontakti kaj malkovri la reciprokan simpation. La floro de amo plej bele kreskas en la sino de la naturo.

Iliaj amikoj en MoRo, en la estraro de SEF, en Grupo Esperantista de Stockholm kaj multaj esperantistoj en la tuta lando el varma koro deziras al Gun kaj Birger feliĉan kaj harmonian kunvivon.

S a l e x.

## EL FRANCUJO.

Instruisto el Besançon skribas inter alie: "La familio 'Samideano' ĉi tie estas tre malproksime de la perdo de la esperoj, ĝi scias ke ni iras al la plia kompreno kaj amo." ... Li finas sian karton jene: "Ni pretigas nin al la laboro por la repacigo de la animoj, kiu baldaŭ estos tiel necesa. Pacon al la bonvolaj homoj kaj bonan volon al ĉiuj! Kun salutoj ... al ĉiuj niaj svedaj amikoj." La karto estis forsendita en julio.

### Sveda Instruista Esperanto-Federacio (Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20  
Telefon 14 93 43

Göteborg V  
Postgiro 3 14 30

## El Finnlando.

### Nova finnlingva flugfolieto.

Signaturo "Tourista" estas verkinta finnlingvan flugfolieton, kiu pritraktas la turismon en Finnlando. Jam antaŭ la nuna mondmilito la turismo eksterlanda estis tre vigla en la lando. Oni kalkulis, ke pr. 100.000 eksterlandanoj ĉiujare vizitis nin. Nun la Turista Societo de Finnlando havas bonegajn planojn: la agentoj de la societo ricevis la taskon ĉie fari nomaron de ĉiuj vidindaj turismaj punktoj, kiel malnovaj kastelruinoj, malnovaj kortegoj, modelaj bienoj, tranoktejoj, naĝlokoj, kulturaj institutoj, naturvidindaĵoj, belaj lagoj (kiuj estas pr. 60.000) ktp. Samtempe la verkinto atentigas kaj akcentas pri la neceso jam nun eklerni ian grandan kulturlingvon kaj la lingvojn de najbaroj. En la fino de la beleta flugfolieto la verkisto varme parolas pri Esperanto rekomdante ĝin: la plej facila kaj utila turisma lingvo, kiun ĉiu povas lerni en sia hejmo. Ĝi estas multfoje pli facila ol iu alia lingvo en la mondo kaj jam vaste uzata de turistoj (ekz. en Finnlando iam kaj ĉitiam karavane vojaĝadas eksterlandaj turistoj, kiuj uzas Esperanton kun granda plezuro kaj utileco. La facila laboro por la turismo estas bone pagita, ĉar antaŭ la nuna mondmilito ĝi donis por lando pr. 200 milionojn da mk poĵare. Oni atentigas ankoraŭ, kie la literaturo estas havigebla (Esperanto-Instituto de Finnlando, Kluuvik. 5 A, Helsinko, kaj ĉe la Fervoĵista Esperanto-societo adr. Järvelä, kiu havas presitan leterkurson).

Manko de lertaj interpretistoj kaj gvidantoj, kiuj konas vidindaĵojn, estas granda ankaŭ en Finnlando. Starigo de turismaj cirkloj, kiuj antaŭenigas la turismon kaj instruas la gvidantojn, estas tial jam planita. Nix.

### Kristana Esperanto-Asocio de Finnlando

havis unikan travivaĵon en la preĝejo de Kärkölä dimanĉon la 29-an de aŭg., ĉar sur la kamparo en Finnlando antaŭe ne okazis tia festo. La programo, sufiĉe vasta, entenis kaj finnlingvan kaj esperantan parton. Predikis pastro Aaro Ahonen, solkantis esperante Ritva Salokannel kaj violonludadon prezentis s-roj Vuolanne el Riihimäki. Staciestro Salokannel faris prelegon pri la neceseco de internacia lingvo, ties granda signifo kaj pri la kristana Esperanto-movado. La parolinto prezentis esperantan literaturon kaj gvidfolietojn, kristanajn kaj aliajn. La feston finis sinjorino Tyyne Salokannel parolante pri la bezono de vekigo kiel la plej bona interligilo de la nacioj kaj plenumante preĝon. La festo sendis salutajn leterojn al kelkaj gvidantaj esperantistoj en Finnlando. Ĉeestis sufiĉe multe da interesata publiko.

### Volas instrui Esperanton.

En la konata, granda taga gazeto Uusi Suomi (Nova Finnlando) estis en aŭgusto legata anonco de persono, kiu aspiras oficon kiel instruisto de stenografio kaj lingvoj, i. a. kiel instruisto de Esperanto.

### Favorabono de Sveda Esperanto-Gazeto.

Samideanoj en Finnlando povas aboni nian gazeton "La Espero" ankaŭ por la jaro 1944 pagante sumon fmk 25:— al la poŝtgirokonto (postisiirtotili) n:o 60253 (de s-ro Joel Vilkki, Somero) en sia proksima poŝtofiĉejo.

### Abono de Malgranda Revuo.

La nova, pure esperanta kulturgazeto MALGRANDA REVUO estas abonebla ankaŭ de finnaj samideanoj. Por ricevi du unuajn numerojn, ili pagu al la poŝtgirokonto n-o 60253 (de s-ro Joel Vilkki, Somero) sumon fmk 25:— en sia proksima poŝtofiĉejo.

## Bär alltid Esperantostjärnan!

Trevliga märken, grön stjärna på vit botten, i normalstorlek, pris pr st. 1:—.

Miniatyrstjärna, samma utseende, kr. 0:75.

Beställ hos FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPE-  
RANTO, Box 698, Stockholm 1.



En senkommen kongressbild från Hälsingborg. Deltagarna samlade nedanför Kärnan.

## SEF Spalten.

Pro la eldiro de Churchill, ke Basic-english post la milito estos la internacia helplingvo, fariĝis vera protest-ondo el la esperantistoj. SEF ricevis multajn proponojn kaj en la gazetoj okazis diskuto pri la mondlingva problemo, speciale en la stokholmaj vespergazetoj. Estas bone se tiu agado daŭros kelkan tempon en la diversaj gazetoj en Svedio kaj kompreneble ankaŭ eksterlande, se oni havas okazon. Skribu ensendaĵon por via loka gazeto se vi havas talenton kaj scion. Per tio vigla diskuto povas esti kreata.

\*

Domingo Pérez en Tarascon sur Ariège, Francio, skribas i. a.: "Ankaŭ mi bone ricevis la gazeton La Espero kaj mi vidas en ĝi la anoncon, kiun vi enmetis, mi dankas al vi tutkore. Jam mi ricevis kvin leterojn de svedaj gekorespondantoj, mi respondis al ili ..."

Cikune mi sendas al vi tri adresojn, kiuj povas esti al vi tre utilaj: S-ro Jean Laffon, 12 rue d'Embarthe, Toulouse (H. G.), Francio (sekretario de la Grupo Esperantista de Tuluzo). S-ro Lucien Claudy, 256 rue Garibaldi, Lyon (Rhône), Francio (sekretario de la Universitat-Esperantista klubo en Lyon. Grupo Nova Sento, Llacuna nro 1 (P.N.), Barcelona, Hispanio ...

La plej korajn salutojn de mia parto al la svedaj gesamideanoj. La francaj gesamideanoj sendas siajn salutojn al la svedaj gekamaradoj."

La ligiloj ne estas rompitaĵoj. Ni esperantistoj povas ankoraŭ korespondi kun eksterlandaj amikoj en nia propra lingvo malgraŭ cenzuro.

\*

Svisa Esperanto-Societo proponis al la laborista esperantoklubo organizon kunigon. Oni ne akceptis la proponon, sed oni decidis pri kunlaboro.

\*

Hungara Esperanto-Federacio havas sekcion por la junularo. La aĝlimo estas 10—23 jaroj, kaj la sekcio, kiu ekzistis unu jaron, sukcesis akiri pli ol cent membrojn. La esperanta studado estas riĉe miksitaj per ĉiaspeca sporto: ekskursoj, skiado, remado ktp. Ni devas admiri la aktivajn hungarajn amikojn. Ĉu ni mem ku- raĝus entrepreni similan eksperimenton?

En kelkaj numeroj de Dansk Esperanto-Blad, eldonata de Centra Dana Esperantista Ligo, aperis diskuto pri organizaj demandoj. La rilato inter la organizoj CDEL, DES kaj DLEA ŝajnas esti ne tiom bona kiom dezirinde. Ni esperas ke niaj danaj amikoj trovos formon de kunlaboro. Al mi ĉiam aspektis strange ke "pacaj batalantoj" nepre volas dividiĝi en diversaj organizoj. Mi suspektas ke tio plej ofte dependas de personaj interesoj kaj zorgo pri la propra digno. Al mi la unueco de la esperantomovado staras kiel unu el la ĉefaj demandoj. Se ekzistas fakaj organizoj por la apliko de esperanto sur specialaj kampoj, tio tute ne devas malhelpi plenan kaj efikan kunlaboron por la komuna celo: disvastigo de esperanto.

Se la publiko rimarkas diversecon kaj malamikecon inter la esperantistaj organizoj, tio en ĝiaj okuloj ridindigas esperanton, kvankam tio devus ridindigi nur la ĝeneralan malfortecon de homoj.

S a l e x.

### OMBUDSMANNEN

deltog jämte sin dotter i Örebro-klubbens möte den 17/8, men fick sedan hålla sig i stillhet några dagar på grund av sjukdom. Han reste emellertid 27/8 till examina i Tranås och fortsatte därifrån till Malmö där han måste inta sängen. Den 2/9 kunde han deltaga i klubbmöte i Hälsingborg och 4/4 fortsätta till SLEA-kongressen i Göteborg, där han framförde förbundets hälsning till SLEA.

Ombudsmannen deltog i styrelsesammanträde i Nansengården, men måste 5/9 resa hem till Örebro för att komma under läkarbehandling för ischias.

Ombudsmannens resplan för oktober:

3—8/10 Karlskoga.

9—15/10 Karlstad, Kil, Skoghäll, Grums, Råda.

(adress: ĉe G. R. Johansson, Tegnérsgatan 16, Karlstad)

16—20/10 Mellerud, Bengtsfors, Dals Långed, Amål

(adress: ĉe Rektor O. Cederbom, Mellerud)

de 21/10 (adress: Folkskollärare Einar Dahl, Uddevalla).

Li skribas: Samideanoj, atentu! La supra plano estas nur provizora. Proksimaj lokoj tuj alskribu laŭ la suprenomitaĵoj adresoj kaj mendu la sindikon al klub- aŭ publika vespero. — Skribu! Telefonu!



**ESPERANTA STUDSERVO**

har just kommit med sin första text. Det är dock ej för sent att anmäla sig. Avgiften är kr. 3:50 och insättes å Malmö Esperantoförenings postgirokonto 38714. Vill man dessutom försäkra sig om även examenstexterna för höst- och vårterminerna, tillkommer 40 öre. Det vore tacknämligt om varje klubb kunde utse någon person med uppgift att uppsamla anmälningar.

**FRAN FÖRBUNDSKASSÖREN.****Ombudsmannafonden (postgiro 2012)**

har sedan föregående redovisning erhållit följande nya teckningar:

	pr år	summa
Thyra Wahlberg, Borås	2:—	6:—
Erik Lindberg, Borås	5:—	15:—
Linnéa Paulsén, Borås	10:—	20:—
Berta Andersson, Borås	2:—	6:—
Bertil Cooper, Borås	25:—	25:—
John Stenström, Ulricehamn	10:—	10:—
G. Wolmer, Tungelsta	10:—	10:—
Malmköpings Esperantoklubb	10:—	10:—
Gerhard Karlsson, Ulricehamn	3:—	3:—
Martin Fejde, Jönköping	50:—	50:—
Oskar Svantesson, Göteborg	3:—	3:—
Signe Stenström, Göteborg	5:—	15:—
Maja Ahlström, Nya varvet, Göteborg	5:—	5:—
Erik Ekström, Göteborg	5:—	5:—
Oscar Persson, Göteborg	5:—	5:—
Majken Eriksson, Göteborg	5:—	5:—
Linnéa Leandersson, Göteborg	5:—	5:—
David Andersson, Göteborg	5:—	5:—
Bertil Zell, Göteborg	5:—	15:—
Guy Nussion, Göteborg	5:—	5:—
Willy Burgemeister, Göteborg	5:—	5:—
Dagmar Lindroth, Norrköping	2:—	6:—
Ossian Nilsson, Hälsingborg	5:—	5:—
Anna Lindberg, Gantofta	10:—	10:—
Torsten Eliasson, Göteryd	2:—	2:—
Sigurd Olsson, Strömsnäsbruk	3:—	3:—
Edvin Falck, Lund	5:—	5:—
Runo Stridell, Sandarne	5:—	15:—
Sune W. Ahlm, Stockholm	5:—	5:—
Karl Söderberg, Uppsala	10:—	30:—
Einar Dahl, Uddevalla	10:—	30:—
Bernhard Eriksson, Stockholm	10:—	30:—
Einar Lemke, Hälsingborg	5:—	15:—
John Stenström, Ulricehamn	10:—	30:—
Ingemar Svensson, Tibro	5:—	15:—
Karl A. Klang, Akarp	3:—	9:—
Eva Julin, Gps I, Stockholm 1	10:—	30:—
Teodor Julin, Stockholm 20	10:—	30:—
Anna Alamo, Stockholm	10:—	30:—
D:ma	1:—	1:—
Rudolf Linse, Jönköping	50:—	150:—
G. Wollmer, Tungelsta	5:—	15:—
Axel Ahlquist, Wärsjö	5:—	5:—
Asta Håkansson, Stureby	5:—	15:—
Valborg Björk, Hälsingborg	3:—	3:—
Edith Bohlin, Stockholm	3:—	3:—
G. O. Karlsson, Eslöv	5:—	15:—
John Ahlström, Halmstad	10:—	30:—
Albin Johansson, Höganäs	2:—	2:—
Gust. Lidbjer, Lund	5:—	15:—
Hjalmar Kihlberg, Vingåker	50:—	50:—
		832:—
Avgår felaktigt redovisat fr. Klippans Esp.klubb		12:—
		820:—
Förut redovisat		4.816:58
Teckningen nu uppe i		Kr. 5.636:58

**Propagandafonden (postgiro 2012)**

har emottagit följande gåvor:

G. Wolmer, Tungelsta 25:—, insamlat under kongressen i Hälsingborg 25:—, eller tillsammans kr. 50:—.


**Gåvor till SEF:s verksamhet**

ha vi fått mottaga från: D. Sölvén, Sthlm 5:— och L. Andersson Smedjebacken 5:—, eller tillsammans kr. 10.

För alla gåvor be vi få framföra vårt hjärtligaste tack.

Birger Gerdman.

## Meddelande från Esperanto-Institutet



Adress: Tegelbacken, Stockholm C.

**Tag examen!**

De skriftliga proven för esperanto-examen avläggas i höst söndagen den 24 okt. Anmälan om deltagande skall ske senast den 10 okt. till institutet, som lämnar alla erforderliga upplysningar. Examenskommittéerna tillse, att alla klubbmedlemmar, som äro mogna för examen, avlägga sina prov!

**Avlagda examina!**

Högre examen: E. Bonander i Karlskoga; Ruben Andersson, Sven Borg och Yngve Svensson i Tranås.

Högre examen har avlagts av Albin Larsson, Hans Christoffersson, Helge André, Ebba Bergstrand, Nils Bergstrand, Olga Malmborg, Oscar Roos, Thorsten Larsson, Erik Petersson, Karl Håkansson och Lilly Holmkvist, samtliga i Malmö, samt Axel Linder i Trollhättan och Holger Lindkvist i Eslöv.

Ni gratulas!

**Esperanta Studservo.**

Beställ denna kurs nu genom att insätta kr. 3:50 på Malmö Esperanto-förenings postgirokonto 38714.

## SVEDA KRONIKO

**Bonega sezonkomenco en Borås.**

Verda Rondo la 16-an de sept. havis sian unuan programvesperon. Dank' al la antaŭe anoncita alloga programo la kunveno havis multe da partoprenantoj. La estraro prizorgis varian programon: Unue "du voĉoj" (f-ino Linnea Paulsén kaj s-ro B. Cooper) prezetis delikatan radiodramon tre inteligente. Poste sekvis gast-rololo de eksterulo, s-ro Erik André — Hamsterlund, kies komika karakterprezentata kapablo donis pluan puŝon al la humoro. La klubprezidanto, s-ro H. Elg ricevis aplaŭdojn ne nur pro sia bonege kunmetita paroladeto pri (kaj kun) muzikaĵoj, sed ankaŭ pro la bona iniciato koncerne la programon. Fine membro de la SLEA-klubo s-ro Wennerberg deklamis bele du poemojn de Fröding kaj — estis vera kafo! Bona komenco.

**LINKÖPING.** La klubo luis elmontrujon en la ekspozicio "Fritid och Framtid". Dum la unua periodo ni elmontris korespondaĵojn de ĉiu mondparto. Pingloj kaj fadenoj indikas, de kie ni ricevis la leterojn. Kaŭze de la ekspozicio okazis esperantotago 16.5. Ĉefaj punktoj de la programo estis komuna vizito al la ekspozicio kaj prelego de s-ino Pähn-Palm el Estonio pri "Tra Eŭropo per Esperanto". Krom la klubanoj en Linköping ĉeestis esperantistoj el Motala, Norrköping kaj Vimmerby.

**Dalarnes Esperantodistrikt**

har möte i Säter söndagen den 17 okt. kl. 1 e.m. Lokal: Wienerkonditoriet.

Alla esperantister välkomna!

## LABORMETODO.

En la diskutoj dum la ĵus okazinta studkonferenco en Skövde aperis kelkaj notindaj vidpunktoj pri propagando kaj esperantistaj labormetodoj. Oni rekonis ke la esperantolaboro entute havas mankojn. La propagando ne efikas en atendita grado, kaj la penado por atingi la celon de nia movado preskaŭ tute ne rezultas. Laŭ tiuj faktoj oni devas konfesi la mankojn kaj konsideri ion pli efikan.

Videble la sveda esperantopropagando ĝis nun ne estis sufiĉe racia kaj unueca. Entute ĝia bazo ne estis saĝa, kaj ĝi havis sufiĉe da psikologiaj kaj taktikaj eraroj.

## Troigo kaj modesteco.

Estas evidente, ke ĉiuj absolutaj troigoj ne bone servas. Aliaflanke oni ofte estas tro modesta kaj kaŝema. Ĉu necesas ĉiam uzi tiujn epitetojn "hjalpspråk", "konst-språk" k.t.p.? Esperanto ja ne estas ia kriplaĵo, sed viva kulturlingvo, tute egala al kiu ajn alia. Ne multe utilas konstanta batalado kontraŭ naciaj mondlingvoj. Oni nur senĉese kondukas la penson de l' publiko jen al tiu, jen al alia mondlingvo. Ofte la propagando pentras anglan diablon sur la muro kaj poste defendas sin kontraŭ li. Antaŭ la publiko oni montras ĉiospecan kontraŭstaron kaj diversajn barojn kaj ĝenerale aperas en defendema stato. Estus pli bone forviŝi ĉion tian el la konscio, simple ne rekoni publike iajn barojn, nur preteriri ilin kaj anstataŭe uzi la rimedojn por montri ke, "jen estas taŭga lingvo, provita, uzata — prenu ĝin!"

## Propagando.

La senco "propagando" kaŝas multon en si. Intencaj troigoj, ruzo, polemiko k.t.p. Tia miksaĵo en la daŭro ne bone servas al bona afero. Evidente necesas dronigi la propagandon kaj anstataŭe ekuzi reklamon. "Sed kostus amase da mono!" Ne, kial? Same kiel propagando reklamo ne estas ia mon-mezuro, nur metodo. Kompreneble ambaŭ kostas, sed reklamo estas pli efika kaj racia metodo. Iam reklamo estis "amerika bluf", sed nuntempe, se ĝi estas efika, metodo, kiu per objektiva informado celas ion atingi. La reklamo estas en si mem racia. Ĝi montras, kie estas bezono kaj kie tiu bezono trovi kontentigon. Ĝi akcentas la veron sed evitas polemikon kaj troigojn. Anstataŭ altrudi ĝi vekas en la publiko intereson, ŝaton kaj akceptemon. Mallonge — la celoj de la reklamo koincidas kun nia bezono.

## Levu la kapon.

Vane oni demandas, kial la esperantistoj ĝenerale estas tiom modestaj kaj kaŝemaj. Nia lingvo absolute ne motivas tion. Ni devas rekoni, ke ni laboras en grava kul-

tura tasko. Ne estas ia honto porti la esperantan ideon, sed meritoplena kaj grava entrepreno. Nia sinteno kaj konduto devas montri, ke ni mem sen ia dubo konscias pri la graveco kaj valoro de nia afero.

Post la paciĝo la mondo urĝe bezonas nian lingvon. Esperanto havas hodiaŭ firman bazon, ĝi estas lingvo jam provita kaj uzata — do preta. En tre proksima estonteco ĝi vidas antaŭ si la plej grandan ŝancon, kiu iam aperis. Ankaŭ la esperantistoj devus nun esti pretaj. La okazado estas nuntempe tre rapida. Jam oni atentis pri la mondlingva problemo, kaj oni jam proponas pri ĝia solvo. La afero ŝajnas rapide evolui, sed bedaŭrinde kaŝas sin la esperantistoj — eble ili eĉ ne rimarkas ke io okazas.

## La taskoj abundas.

Laŭ tiuj signoj ni ne venkos per sola, forta bato. Se tiel ne okazos, ni devos persisti en la ĝisnuna metodo — esperantigo de homo al homo. Sed tiu metodo estas malrapida, ne-efika, oni devus enigi ion freŝan en ĝi. Necesas malaltigi la perdojn el studrondoj kaj la korespondakurso. La lingva nivelo de la "mezesperantisto" devas leviĝi. Pli multe nia lingvo sonu en la kluboj. La studrondoj devas esti pli firme gvidataj. Konvena materialo por komencantoj preskaŭ ne ekzistas. Ni bezonas novan, pli interesan kaj habilan korespondakurson. Necesas ia instrua informilo por kursgvidantoj. La propagandiloj bezonas tute novan aspekton. La taskoj abundas. Atakante praktikan kaj kernan taskon ni ofte progresigus nian aferon anstataŭ bremsi ĝin, dum ni rompas la kapon pro flankaj aferoj aŭ organizaj bagatelaĵoj.

J.

## PRESSINFORMATION.

Je la starto de Svenska Esperantoförbundets Pressinformation ni promesis apogon per mono, kolektata en la propaganda fondo. Ĉar tiu fondo dum la lastaj jaroj ricevis nur malgrandan kontribuon, ni ne povis elspezi sufiĉe da mono por Pressinformation.

Se vi volas apogi tiun tre gravan flankon de nia laboro, sendu monon al Svenska Esperanto-Förbundets Propagandafond, poŝtkonto 2012. Per la mono kolektata en la fondo ni apogas tian propagandon, kian ni konsideras necesa.

S a l e x.

## VI ERINRA OM

den planerade propagandabroschyren, som behandlades i en artikel i septembernumret. Tänk Er in i saken och meddela Edra tankar till Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, som tacksamt tager emot alla förslag.

## Skaraborgs läns esperantodistrikt

hade den 26 september sin sedvanliga höstkonferens för att dryfta aktuella spörsmål inför en ny studiesäsong. I stadsbibliotekets läsesal hälsades ombuden av hr Emil Falk. De avgåvo sina rapporter om den gångna studiesäsongen och erfarenheterna från studiearbetet under de gångna krigsåren.

Två föreläsningar stodo på dagens program. Läroverksadj. John Stenstöm, Ulricehamn, talade på esperanto om minnen och hågkomster från de internationella esperantokongresserna och esperantodistriktets studie-

ledare, hr Lennart Aberg, Skövde, belyste organisations- och propagandafrågor. En livlig diskussion följde.

**STOCKHOLM. Grupo Esperantista.** Inter la kunvenoj en septembro oni povas mencii la komunan kunvenon de la diversaj kluboj en Stockholm la 22, kiu enkondukis la verdan semajnon. Tiam la prezidanto rakontis pri la agado de la esperanto-organizoj kaŭze de eldiro de Churchill pri Basic-english.

Kiel kutime la grupo kunvenas ĉiumerkrede en la ejo Luntmakaregatan 15 je la 20a horo.

## Ivan kaj Stojan — metilernantoj.

Bulgara rakonto.

Ivan kaj Stojan fariĝis metilernantoj ĉe la plej bona mastro — ŝuisto Nikola. Li havis trioble pli multe da metilernantoj, kiujn li amis kvazaŭ siajn infanojn. Baldaŭ li ekamis la laboremajn kaj lertajn — Ivan kaj Stojan. Grandan konfidon li havis al ili kaj loĝigis ilin en sia hejmo, kaj ĉiam ilin sendis ricevi varojn, monon kaj alion.

Inter la metilernantoj de mastro Nikola estis junulo nomata Jorgo, li estis tre ruza.

Kiam avino Neda, la edzino de mastro Nikola, alportis manĝaĵon kun viandpecoj, Jorgo ruze fleksis sian kule-ron, prenis la plej grandajn viandpecojn kaj diris:

— Vidu vi kia bonŝanco, vidu vi kia bonŝanco.

Ivan kaj Stojan rimarkis ĉi tiun agon. Kelkfoje ili toleris lin, sed foje kiam Jorgo etendis manon antaŭ Ivan, ruze eltiris viandpecon kaj diris:

— Vidu vi kia bonŝanco!

Ivan stariĝis, vangofrapis lin kaj diris:

— Vidu vi kia eraro!

Jorgo ekploris kaj stariĝis batali kun li, sed Stojan kaptis Jorgon per la du fingroj je la kolo kaj per unu piedfrapo eljetis lin el la ŝuejo.

Sed Jorgo ne malkutimiĝis de sia ago. Pasis kelke da tempo kaj li komencis ree ruzi.

Foje avino Neda alportis fromaĝon, olivon, lardon kaj fruktojn. Jorgo manĝis frandeme kaj metis de la manĝaĵo en la poŝon.

Sed Stojan rimarkis ĉi tion, prenis kruĉon kaj plenigis je akvo lian poŝon.

Jorgo ekkriis.

— Kial vi krias? diris trankvile Stojan.

— Kial vi plenigas je akvo mian poŝon? kaj ekploris.

— Ĉu kial? Ĉar, kiu manĝis, devas trinki. Via poŝo manĝis kaj mi donas al ĝi trinki iom da akvo por ke la manĝaĵo ne restu ĉe la gorgo de la poŝo.

Apud la ŝuejo de mastro Nikola estis butikoj kies posedanto estis nomata Poliksen. Ĉiuj metilernantoj el la ŝuejo kaj ĉiuj homoj aĉetas de li konfide — fromaĝon, sukeron, fiŝon, figojn kaj aliajn manĝaĵojn kaj sabate, kiam ili ricevas monon, ili pagas sian ŝuldon. Ankaŭ Ivan kaj Stojan aĉetas de li.

Foje ili restis ŝuldantaj al Poliksen po cent levojn kaj sabate ili ne pagis al li, ne ĉar ili ne havis monon, sed tiam ili vidis hazarde avon Stoiĉko el ilia vilaĝo kaj ili donis al li ĉiun monon. Ivan sendis al sia patrino, ĉar venas la vintro, kaj Stojan sendis al siaj gepatroj por saluti kaj ĝojigi ilin, ke li ne perdas la tempon vane en la urbo. Post unu tago Poliksen venis en la ŝuejon kolektanta. La batita Jorgo, kiun Stojan batis, diris al Poliksen, ke Ivan kaj Stojan sendis sian monon en vilaĝon, kaj ke post unu semajno ili forlasos la urbon.

— Vi pagu tuj vian ŝuldon, alie mi prenos viajn paltojn.

— Baj<sup>1</sup> Poliksen, — diris trankvile Stojan, ni intencis preni de nia mastro monon kaj doni al vi, sed li hieraŭ iris pro laboro en Gabrodon<sup>2</sup>. Li revenos post kvin tagoj kaj tiam ni tuj pagos al vi.

— Ne! diris Poliksen, mi ne kredas al vi, kaj etendis manon por preni iliajn paltojn.

Jorgo tre ĝojis, ke venĝo venis al ili, Ivan sin ĵetis bati Poliksenon, sed Stojan kaptis lin.

— Ivano, lasu lin preni la paltojn — diris Stojan, kaj kiam revenos la mastro ni prenos monon kaj pagos al li por rehavi niajn paltojn.

Mastro Nikola revenis, kaj ili pagis al Poliksen.

Pasis kelke da tempo. Stojan kaj Ivan interboniĝis kun Poliksen kaj komencis ree aĉeti ĉe li.

— Baj Poliksen, diris Stojan, donu al mi unu kilogramon da maizo, kaj li pagis ĝin.

Poliksen ekmiris, kial Stojan aĉetas ĉi tiun maizon, sed li ne demandis Stojanon, sed prenis la monon kaj donis al li maizon. Je la alia tago Poliksen komprenis, kial Stojan aĉetis la maizon. Tagmeze, kiam metilernantoj de mastro Nikola ripozis, Stojan sidiĝis antaŭ la ŝuejo kaj ĵetadis maizon al la du anseroj de Poliksen. Post kelke da tagoj la anseroj tiel ligiĝis al Stojan, ke ili forgesis iri bani en la rivero kaj tuttage kuŝadis antaŭ la ŝuejo de mastro Nikola por atendi Stojanon. Poliksen

## Kukola valso.

(Vals i gŝkottan.)

Brilas eta golf kiel vaksita plank.  
Sun el mar leviĝas, odoras padusoj,  
Kaj fringo en arbet, kiu dormis sur branĉ,  
Vigle nun ekpepas: kvit, kvit! kvit, kvit!  
Iru ni boaton por mara vetur!  
Remu ni al herbinsularo florborda  
Kun manĝ kaj gramofono por nia plezur!  
Gaje akompanu al ni kukol!  
Aŭdu nun! Krias jam kukol en okcident.  
Tia krio plej feliĉa vok!  
Nordkukola estas teda vok,  
Sed sudkukola la morta vok,  
Kaj orienta la konsola vok,  
Sed krias nun kukol el okcident.  
Ĉu, knabin, vi aŭdas nun: kuku! kuku!?

Klara estas l' akvo jen kiel kristal.  
Vidu! La fiŝetoj tremsaltas, baraktas.  
Ezoko en kanejo, naĝanta ŝakal!  
Trilas kantoturdo en pina hal.  
Ĉarma, radianta junia fest-tag!  
Jen la sun lumigas la arbojn kaj ondojn.  
Anasoj kun la idoj fornaĝas sur lag.  
Haltu ni momenton dum nia vag!  
Aŭdu nun! Krias jam kukol en okcident.  
Tia krio plej feliĉa vok!  
Nordkukola estas teda vok,  
Sed sudkukola la morta vok,  
Kaj orienta la konsola vok,  
Sed krias nun kukol en okcident.  
Ĉu, knabin, vi aŭdas nun: kuku! kuku!?

El "Evert Taubes bŝsta" trad. G. O. Karlsson.

vidis ĉi tiun aferon, sed ŝajnis, ke li nenion scias. Post unu semajno Stojan aĉetis ankoraŭ unu kilogramon da maizo.) Poliksen donis ĝin, prenis la monon kaj ree ne demandis Stojanon, kial li aĉetas la maizon.

Poste Ivan daŭre aĉetis du-trifoje maizon.

Poliksen, vidante, ke Ivan kaj Stojan tre bone nutris la anserojn, mem ĉesis nutri ilin. Li nur atentis vespere ĝustatempe enfermi ilin en la kokejon, ĉar li timis la petolemulojn.

Tiel pasis tuta monato.

Sed unu matenon sur la vendoplaco kolektiĝis amaso da homoj por rigardi miraklon.

Estis je la fino de la monato. Ivan kaj Stojan venis tre frue malfermi la ŝuejon de mastro Nikola. En ĉi tiu momento la anseroj venis por manĝi maizon. Ili kaptis la anserojn, senplumigis kaj lasis ilin. Samtempe ĉiuj homoj iris al sia laboro kaj vidante la anserojn ili haltis por rigardi la miraklon kaj tordiĝis pro rido. Venis ankaŭ Poliksen, li faris por si vojon inter la homamaso kaj vidinte la senplumigitajn anserojn li kaptis sin je la kapo.

— Kiu faris ĉi tiun miraklon? — demandis Poliksen.

— Ni ambaŭ, mi kaj Ivan, diris Stojan, ĉar ili ne povis pagi al ni por la maizo, per kiu dum unu monato ni nutris ilin, kaj ni prenis iliajn paltojn.

Apenaŭ nun Poliksen komprenis, kial ili faris tiel.

Hazarde preter ili pasis la regionestro kaj Poliksen plendis al li pri la petolemuloj.

— Sed Ivan kaj Stojan rakontis al la regionestro pri la agmaniero de Poliksen kaj la regionestro komencis ridi.

— Sed nun s-ro regionestro — kion mi faru? diris Poliksen.

— Vi pagu la ŝuldon de la anseroj, diris Ivan, kaj ni donos iliajn paltojn.

Aŭdinte ĉi tion la regionestro ankoraŭ pli ekridis kaj batetis ilin surdorse kaj diris:

— Brave, knaboj, brave!

Por tia barbo — tia razilo.

Tradukis el la bulgara Ivan N. Minev.

1) Kutima bulgara turno al pli aĝaj homoj.

2) Urbo en Bulgarujo.

## Finna popolkanto.

(Svede: "Plocka vill jag skogsviol...")

Kolektos, kolektados mi en la arbarsalon  
plenbrakon da erik, viol — kunligos al florkron.  
Pirolo, timiano pri la amik pensigas min —  
kaj multon ekmemoras mi kun floroj en la sin.

Jen la vojeton, kiun ni en la vespera pac  
promenis kaj jen sidis ni sur mola muskmatrac.  
Se eĉ alia estus, al kiu manon donus vi —  
ĉe vi en revoland kun am fidela restas mi.

Tutsola mi fariĝis nun kaj sola iros mi  
sen famo kaj sen mono surtere tie ĉi.  
Neniu ŝteli povas trezoron mian de memor —  
mi estas tiom riĉa en somernokta hor.

Al esperanto de Valde printemp.

## LINGVAJ DEMANDOJ

### Evoluo de insektoj.

En nia lingvo ne regas plena ordo kaj abstrakta korekto rilate al sciencaj terminoj. Tio estas komprenebla, ĉar la kampo estas ege vasta, kaj tiaj mankoj estas sufiĉe grandaj ankaŭ en naciaj lingvoj kaj latino.

Antaŭ nelonge kaptis mian atenton niaj terminoj por insektaj transformiĝoj. Ioma konfuzo regas tie, sed ni povas facile forigi ĝin. Ĉiuokaze estas bone havi klaran imagon pri la senco de la vortoj.

La latinaj vortoj por la diversaj stadioj estas (laŭ faka libro): ovum, ägg — larva, larv — pupa, puppa — imago, den färdiga insäkten.

La unua estas en esperanto ovo kaj la lasta estas imago. Tiuj vortoj estas la solaj kaj korektaj. Sed la du mezaj donas konfuzon.

Por la latina larva ni havas la vorton larvo. Ĝi estas tute klarsenca. Sed krome ni havas la germandevenan räupo. Mi ne scias, kiel tiu vorto venis en esperanton. En la vortaro de Nylén ĝi estas tradukita per larv, löv-mask. Plena vortaro difinas ĝin "larvo de papilioj kaj kelkaj aliaj flugilaj insektoj". Jen facile fariĝas konfuzo, kiun ni devas eviti. Ŝajne ni ne devas uzi la vorton por kiu ajn larvo sed nur por larvoj de "papilioj kaj kelkaj aliaj flugilaj insektoj" (la vortaro ne diras kiu). Laŭ mia opinio papilia larvo tute sufiĉus por esprimi la ideon, sed räupo fariĝis tiel viva kaj ofte uzata vorto, ke ĝi verŝajne ne malaperos. Sed memoru ĝian signifon!

Por la latina pupa ni havas la klarsencan pupo. Krome troviĝas krizalido. Laŭ Nylén tiu estas pupo, laŭ Plena vortaro pupo de papilioj. Kiel räupo la vorto estas ne necesa. Se ni tamen uzas ĝin, ni estu klare konsciaj pri ĝia signifo.

Krome troviĝas la vorto nimfo (en la scienca signifo). Laŭ Nylén ĝi estas pupo. Tio estas eraro. Plena vortaro havas difinon, kiu ne donas klaran sencon sed nepre erarigas. Nimfoj estas certaj insektoj en certa evolua stadio, sed tiaj insektoj ne havas pupan stadion kaj ne transformiĝas tiel, kiel ekz. papilio. Tiun vorton ni lasu por sole scienca uzado.

Resumo: la vortoj larvo kaj pupo plene taŭgas por ordinaraj bezonoj kaj respondas al la latinaj (kaj sekve internaciaj) terminoj. Uzante aliajn ni uzu ilin kun klara koncepto pri ilia signifo.

Stellan Engholm.

## Svenska Esperanto-Tidningen

### La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Box 698, Stockholm 1.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris Från 1943: helt år kr. 4:—, Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgiften i SEF: Direkt anslutna medlemmar erlägga 7:50 kr. pr år och erhålla tidningen gratis. Föreningar erlägga för varje medlem en årlig avgift av 2:— kr. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 10 53 27). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.).

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Ĉefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrens-vägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

## AFIŜO

— efika reklamilo por la studlaboro. Interesiga teksto — alloga aspekto — bonkvalita papero. Restas nur malgranda stoko. Prezo 10 öre + sendk. MENDU TUJ!

**SKOVDE ESPERANTOKLUBB**

VILLAGATAN 3, SKOVDE.

### KORESPONDADO.

Dek kvin PTT-esperantistoj serĉas korespondadon, se eble kun gekolegoj. Adresojn peras A. Attinger, Richtenswit (Zürisch).

Gustav Adolf Nygård, Väderkvarnsgatan 177, Göteborg, Svedujo, dez. koresp. kaj interes. leterojn kaj bildkartojn kun eksterl. esp. (ankaŭ svedaj).



**Belaĵo por sinjorinoj!**

**Kolpendaĵo — verda stelo**

kun surskribo: ESPERANTO.

Prezo kr. 1:25.

Ŝatata donacobjekto, uzbla ankaŭ de sinjoroj kiel breloko.

**ELDONA SOCIETO ESPERANTO**

Stockholm 1. Box 698. Tel 31 65 01.